Raporto pri Edukaj Aferoj

Klasoj

La personoj kiuj sendis raportojn faras agojn, kiuj estas simila al la kutimaj klasoj pri esperanto:

Unu persono—Doroteo Holland, instruis longtempan, dauxran kurson. Sxi instruis tri plenkreskulojn en la hejmoj de sxi kaj aliaj. La studanto nun estas progresintoj, kaj legis pli ol 20 libroj, kaj ecx komparis kelkajn unu al la alia en du kazoj. Estas senpaga kaj amika.

Simile, Ron Glossop instruas senpaga kurso, sed en lia pregxejo. Estas prezento pri Esperanto al 6 personoj, kiuj konvenas monate por unu horo. La agxoj estas 15 ĝis 45.

Finfine, por la jaro 2008, estas Kim Keeble, en Kanado, kiu instruis infanojn en lernejo. Estas esperanto-klubo, kiun patro de studanto kaj volontulino instigis. Unue ili donis prezenton al studentoj. Poste, la nunaj sep studantoj pli kaj pli interesigxis. La studanto havas inter 8 kaj 12 jarojn, kaj kunvenadas semajne dum la meztagmangxa horo.

Mi komprenas, ke eble estas aliaj klasoj kaj kursoj (Kaj mi memoras, kiam mi instruis, mi plejparte ne raportis, mi antauxeniris al la venontaj klasoj). Mi deziras, ke ni plifaciligos la raport-formularon kaj sistemon, eble per e-posxto kaj/aux mezurilo.

La AAIE ttt-ejo estas malnova – pritraktas eventojn dum 2003.

Prelegoj

Alia afero pri edukado estas tion, kion ni ne kalkulis en antauxajn raportojn. Estas prelegoj al grupoj pri esperanto kaj la mondsituacio pri lingvoj kaj pri tergloba komunumo. Ekzemple, dum 1988-1990, mi prelegis pli ol 100 fojoj pri Esperanto, aparte de la klasoj, kiu mi instruis. Ili ne estis en la raporto, sed vere edukas aliajn pri Esperanto. Mi anoncos pri cxi tiu kaj invitos informon pri la prelegoj – tipon de gro, nombro de auxskultantoj, reklamoj, ktp.

(Por la dua jaro. Mi kaj mia filino prelegis al junuloj cxe Michigan State University World Language Day.)

Fremdlingvaj Asocioj

La tria afero estas prezenti esperanton al fremdlingvaj asocioj (aux Mondlingvaj Asocioj!). Antaux 20 jaroj, mi cxeestis la Michigan Foreign Languages Association dum tri sinsekvaj jaroj. Dum la dua konveno mi faris prezentajxon pri Esperanto. Dum la tria kunveno, la asocio asignis al mi 2 kaj ½ horoj en la programo por ‘workshop’ en kiu mi prezentis kaj instruis Esperanton – kaj pagis min! Instruisto, post la sesio, venis al mi kaj ekkriis “This is a no-fail learning experience!” (“Tio estas nepre sukcesa lern-sperto!”).

En 2008, mi revenis al la konferenco dela Misxigana asocio, akj en 2009 mi cxeestis du konferencojn – Central States en Sxikago dum marto kaj Ohio dum aprilo. Dum mia partopreno, neniu, aux preskaux neniu, mokis min; fakte, kelkaj instruistoj diris, ke ili instruas pri espoeranto en iliaj klasoj. En Sxikago, unu el miaj samcxambranoj interesigxis kaj eklernis Esperanton! Mi proponis sesion pri Esperanto por cxiuj dum la venonta konferenco.

Mi acxetis libron nomita “The Five Minute Linguist”, en kiu, je mia suprizo, estas artikolo “Whatever Happened to Esperanto?” kun danko al Don Harlow pro informo, kaj Esperanto estas menciita, favore, en la sekva artikolo. La lasta du frazoj estis: “In a

newly-interconnected world, why shouldn't more of us learn Esperanto as a second language? It's quick, it's easy, and – tanks to the Internet—it can be used worldwide". Estas (nur) 11 sxtatoj, en kiuj estas la bezono lerni alian lingvon, kaj estas 4, kie estas proponita. Estas 31 regionaj asocioj de lingvaj instruistoj. Ni havas pordon, tra kiu ni povas pasxi. Ni faru tion! Mi deziras helpi kun Pov-Punkta Prezento por ili, kiu aliaj povas uzi.